

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*



CAMPAGNE ORGANISÉE PAR
ESPÉRANTO FRANCE ET SAT-AMIKARO

l'espéranto au bac?

JĖS!*

**oui!*

WWW.ESPERANTO-AU-BAC.FR
SIGNEZ!
PÉTITION PARRAINÉE PAR ALBERT JACQUARD

A poster with a blue, swirling background. At the top, the text 'l'espéranto au bac?' is written in a white, cursive font. Below it, a white speech bubble contains the word 'JĖS!' in red, block letters, with a red asterisk to its right. A red line below the speech bubble suggests a mouth. In the bottom left corner, the text '*oui!' is written in white. At the bottom right, an orange banner contains the website 'WWW.ESPERANTO-AU-BAC.FR', the word 'SIGNEZ!' in large black letters, and 'PÉTITION PARRAINÉE PAR ALBERT JACQUARD' in smaller black letters. The background also features a green and blue globe of the Earth and several white stars.

Lançite!



Mia unua kongreso

Mi estas-ro Jozefo Chirimwami Sironge el Demokrata Kongo-lando. Mi naskiĝis en Bukavu-urbo (Orienta Demokrata Kongo-lando). Mi alvenis en Francion la 12an de Februaro 2010 kiel rifuĝinto. Seto estas mia unua esperanta kongreso.

Laŭ mi la kongreso estis sukceso por mi ĉar mi konatiĝis kun grandfamaj esperantistoj kaj la kongresa etoso estis granda kaj varma. Mi ĝojis viziti la mediteranean marbordon ĉar tio memorigis al mi Afrikon.

Pro tio, mi multe dankas la komitatajn membrojn de SAT-Amikaro kiuj ebligis mian partoprenon. Mi do konfirmas ke Esperanto estas lingvo de paco kaj amikeco ĉar dank' al Esperanto, mi malkovris s-inon Elisabeth Barbay kiu gastigis min dum pli ol unu jaro ĝis obteno de mia restadpermesilo. Ĉiuj esperantistoj kiujn mi renkontis dum mia jar-restado en pariza regiono estis ĝentilaj, agrablaj, pacaj kaj amikemaj...

Mia mesaĝo sindirektas al ĉiuj popoloj tutmondaj, por ke ili kuniĝu al ni, por ke ni kune konstruu unu mondon sen limoj dank' al Esperanto.

Kongresis ni en Seto.

1. Dominique Gautier en debato post premiera prezentado de sia filmo pri Esperanto.

2. Jacques Yvart omaĝas al Seto kaj ties prestiĝa ido **Georges Brassens**, kantante «verda benk'» por la urba reprezentanto, tamen samtempe por la kongresanoj.

3. Guy Martin prelegas pri migrado,

4. Jozefo rakontas sian odiseadon ĝis Francio.

5. Abel Montagut prelegas pri la lasta nefinita romano de Julio Verno (Jules Verne).

6. Marek Blahuš prelegas pri Vikipedio. Li zorgas pri E@I (edukado ĉe Interreto), kiu interalie planas enretigi PIVon (vidu anoncon ĉe paĝo 6).

7. Veroniko deĵoras efike (kiel kutime) ĉe la impona libroservo de SAT-Amikaro, kun inter aliaj, la novaĵoj de SAT-EFK: «La aliulo» de Serĝo Elgo (postmorta eldono) kaj la esperanta mapo de franclingvio.

8. FaMo muzikas. Ĉu utilas plu prezenti tiun famulon ?

9. Narendra Raj Bhattarai prelegas pri sia lando, Nepalo.

10 LOKO (Loka Organiza Komitato) sidas ĉe la kongresa loko... Ĝi estu gratulata kaj dankata !

11. La multaj aliaj kontribuantoj grupiĝas en ĉi lasta bildo, kiu ne trovis lokon en ĉi paĝo, nur pro la mallerteco de la enpaĝiganto.

Fotoj: Frédéric Scibor (1,2,7,8); Bruno (3,4); NicoRay (5,6,9); Nekonatulo (10) (li/ŝi sin anoncu por havi la grandan honoron vidi sian nomon en nia prestiĝa revuo !), La mallerta enpaĝiganto (11)

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo. **Enpaĝiganto:** Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo:** Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de:** Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos, Lino Markovo.

Partoprenis en ĉi numero: Andreo Andrio, Bruno, Jeanne-Marie Cash, Jacques Caubel, Janine Dumoulin, Louis Gohin, Jozefo, NicoRay, Mireille Grosjean, Phil Guichet, Klod, Paul Lafont, Ĵak Le Puil, Guy Martin, Lin' Morel', Frédéric Scibor, Serĝo Sir', Cercle Biterrois d'Espéranto.

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo «Espéranto au bac !»
- 2-3 Kongresis ni en Seto
- 4 Legindaj legendoj
- 4-5 Jules Durand
- 5-6 Selle humuraĵoj
- 6 Atuto KER' !
Esperanto en FIPAM
Reta versio de PIV
- 7-8 Kiel traduki Point (unua parto)
- 8 Libro-servo
- 9 Libroj vivas pli longe ...
- 10 El nia leterkesto
- 10.11 SAT-Amikaro Kontadraporto
- 11 Komuniko de FEI
- 12 Alvoko por la muro de la federiĝintoj
SAT-kongreso en Sarajevo
- 13 HuMorelaj Linioj
Plu moviĝas la Movado
- 13 Demain le Printemps
Canto General en Tuluzo
- 14 Café-Espéranto
Une langue universelle...
- 14.15 «Espéranto au bac !»
- 16 Pribalena historio
- 16 Ĉe la lago 74



Se vi posedas tiun bildon en bona difino, aŭ scias kie trovi ĝin, bonvolu informi SAT-EFKon, aŭ La Sagon, kiu transdonos.

Estos vi eterne dankata...

SAT-EFK

<http://www.satesperanto.org/>
eldonkooperativo/

Kontribuajoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Serge Sire (Serĝo Sir')
85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : lasago@free.fr

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

pribalena historio

Jam de longe la «*balanaenoptera physalus*» aŭ ordinaraj rorkvaloj iras kaj reiras tra Mediteraneo kaj de tempo al tempo balenoj grundas sur la marbordon.

Vidite de la maro la monto *Saint-Clair*, kiu superas la urbon Seto, similas balenon. Ĝis 1928 oni skribis la urban nomon «*Cette*», kiu devenas de la latina balena nomo «*Cetus*» kiel la hispana urbo *Ceuta* sur la marokia teritorio. Do la emblemo de la urbo estas la baleno. Ankaŭ la entrepreno de mara salo elektis tiun beston sur la salskatoloj.



Dum la 20a jarcento, iu knabo interesiĝis pri baleno, kiam li malkovris unuan oston de tiu besto. Li studis la geologion kaj la bestaron de sia regiono. Kiam en 1989, dua baleno finalvenis sur la strandon de lia urbo *Port la Nouvelle*, tiu viro nun plenkreskulo kaj vitisto decidis reekhavi



tiun beston. Li sukcesis kun nur tri helpantoj dispecigi ĝin kaj transporti ĝiajn ostojn per traktoro kun postveturilo. Li metis la ostaron en marĉeton por purigi ĝin dum tri monatoj. Poste li restarigis la skeleton de tiu plenkreskula baleno (20 m longa kaj 40 tunojn peza) en sia vinkelo.

Tio estas rimarkinda laboro de metiisto, kiu bonege konas la anatomion kiel scienculo. Nun tiu aŭtodidakto estas spertulo por la regiono Langvedoko.

Nun ni povas viziti lian kelon kaj admiri la

belan balenan skeleton. Tiu vitkulturisto montris al ni aliajn skeletojn (makrocefalo, birdoj kaj mamuloj) kaj originalan vinpremilon de la 21a jarcento.

Kompreneble oni povas aĉeti botelojn da ruĝa aŭ rozkolora vino kun la desegno kaj la historio de la baleno ĉe Patricia kaj Jean-Louis Fabre, Domaine des Jugnes, route de la Palme en Port la Nouvelle (11210). Tel: 04 68 48 00 39.

Cercle Biterrois d'Espéranto

